Augusto Casquero, kiu informis pri prepar-laboro de U.K.-Valencio, dankis helpon de kelkaj madridanoj kaj petis voluntulojn por prepari post-kongreson en Madrido dum unuaj tagoj de aŭgusto.

La antaŭkongreso okazos en Barcelono.

T-ĈEMIZOJ

Kiel pasintjare MEL oferas someran T-ĉemizon po 600 ptjn plus sendokosto. 20% rabato se vi aĉetas pli da 20. Ni sendas reemburse.



ADRESARO DE ESPERANTAJ GRUPOJ

MEL denove petas al ĉiuj grupoj kiuj ankoraŭ ne sendis siaj datumoj (vidu modelo aneksita) bv. sendu rapide por eldoni kompletan adresaron de VERE FUNKCIANTAJ Hispanaj Esperantaj Grupoj, kun oficialaj datumoj se eblas. (Se vi jam sendis viajn datumojn bv korektu erarojn aŭ kompletigu ilin).

POR DONACI

Por viaj geamikoj ne esperantistoj MEL sugestas donaci ekzemplerojn de lernolibro "Parolu Esperanton". Prezo 500 ptjn plus sendokosto. Ni sendas reemburse.

ORA KAPRO

Asociacion de Esperantistas Cabreados de Madrid donis sian premion al usona entrepreno "Wordperfect Corporation" kiu en la ASCII-aj karakteroj por enkumputiligi esperantajn tekstojn uzas maldikan "j" kiam oni metas ^ . Vidu: j, j anstataŭ ĵ. Feliĉe M.G.Adúriz kreis programeton por korekti tiu-ĉi malsimileco.

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

5-9-a de junio. Eŭropa Kongreso de Esperanto. Verona (Italia).

3-a Kongreso de Valencia Esperanto federacio. 21-28-an de junio. Callosa de Segura (Alicante). Omaĝo al S-ro. Zaragoza Ruiz.

13-18a aŭgusto. Esperantista Renkontiĝo. Alsasua (Euskadio)

77-a Universala Kongreso. 27-a julio-1-a aŭgusto. Vieno (Aŭstrio). KARAVANO

AL VIENO: Foriro ekde Barcelono la 26-an de julio, reveno la 2-an de

augusto. Aviadilo + hotelo + matenmanĝo = 59.900 ptj. Informas GRUPO DE

VALENCIA (93) 3.84.96.16 (respondilo) persone merkrede ekde la 19.00 h

KRISTNASKA LOTERIO

Kiel vi jam konas la netan profiton de Kristnaska Loterio estis 155.600 ptj (160.000 enpezoj- 4.400 elspezoj, malgranda cifero parte dank'al Lupe kiu atingis senpagajn blokojn). Dum lotado nia numero estis premiita reemburse, tiu-ĉi alportis pliajn enspezojn (181.760 ptj). TOTALA PROFITO ESTIS 337.360 ptj.

La estraro de MEL dankas al ĉiuj liceanoj kaj amikoj kiuj helpis pere de vendado aŭ lasante reembursemon monon kiel profiton por MEL.

VENONTAJ PROGRAMOJ

Ciu lunde ni kunvenos dum junio je la 19.00 horo en Atocha 98-4º.

15-an de junio, lundo. M. Fernández gvidos konversacian rondon "Impresoj pri Hispana Kongreso de Merida". 19,00h..Atocha 98.

24-an junio komuna vizito al "Etnologia Nacia Muzeo". Alfonso XII n-ro 68. Ekspozicio: "Templo je la scienco. Historio de la muzeo". Ni fikso horon en la kunveno de la antaŭa lundo.

OKAZIS EN HISPANIO

En Sabadell oni inaŭguris novan ŝtonplaton en la Ronda Zamenhof, la plej antikva strato dediĉita al la Majstro (1912). Sur tiu-ĉi strato staras monumento al Zamenhof.

OKAZIS EN MADRIDO

En Madrido la ekspozicio pri "Mafalda" montriĝas, inter ne legaj eldonaĵoj, bulteno de franca Esperanto-grupo kun komiksa desegno pri Mafalda kaj teksto en Esperanto.

Ĉe MEL prelegis pri Izraelo S-ro. Haroun. Post la parolado okazis interesan kvolokion.

Dum majo vizitis nian sidejon S-rino el Polando kiu turismadis tra Portugalio kaj Hispanio post la kongreso de Merido. Ana, kiel paŝporta-servulino gastigis ŝin en ŝia hejmo.

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Atocha 98-4º

28012 Madrid

Asociación de Utilidad Publica



NIA VOĈO

Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.29012 Madrid

Redaktas Lupe Sanz

Julio-Aŭgusto 1992

OKAZIS/AS/OS EN HISPANIO

En Granado dum julio okazos Internacia Kongreso CO-PLANET 92 kies ĉefa temo estas "Kunlaboro". Unu el la oficialaj lingvoj estas Esperanto.

Pasintan aprilon okazis en Kordovo akademianiĝo de Antonio Moya, Casado, ene de Reĝa Akademio pri Sciencoj Beletroj kaj Noblaj Artoj. S-ro Moya, madrida esperantisto kaj muzikisto, paroladis pri "Esperanto kaj muziko kiel universala lingvo." FELIĈON ANTONIO!!!

SOMERUMI EN ESPERANTUJO

La ofero por somerumi kun esperantistoj estas diversa, vidu:

29 julio-17 aŭgusto. Somera Kursaro. San Francisco State University. USONO (Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 941010; Tel. +1-415-342-1796)

23 julio - 5 aŭgusto. Lernu, praktiku kaj perfektigu/Seminario Cseh Metodo. Gresillon. Francio.

27 julio- 9 aŭgusto. Internaciaj kursoj. Pisanika, Bulgario.

Se vi estas interesata bv. peti kompletan adresaron ĉe MEL (lundes- vespere).

Ankaŭ ni sugestas diversajn vojaĝ-agentojn kiuj organizas turneojn en Esperanto. Jen: ESPERANTOTUR. Str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094, Bydgoszcz, Polando. ESPERANTOTURIST.Str. Positano 40, BG-1000, Sofio, Bulgario. ESPERANTO VOJAĜOSERVO DE USONO. p/a Travel Service Montclair, 6104 La Salle, Oakland, CA 94611 USONO.

ORA KAPRO

Dum tiu-ĉi monato kaj, eble, kiel unua fojo en la homara historio, la prezidantino de "Asociación de Esperantistas Cabreados de Madrid" mem-premiis. Ŝi, kiel redaktorino de "Nia voĉo", rekonante amaso da gramatikaj eraroj kiuj aperis en la lasta numero, kaj meritante rezencon en "Papers malliberulejo" de Heleco mem-donas ORAN KAPRON en la supera kategorio.

1-a EUROPA KONGRESO. VERONA (ITALIO) (informas Juan Navareño)

La unua Eŭropa Esperanto-Kongreso okazis en Verono (Norda Italio) je la komenco de junio. Partoprenis 370 kongresistoj el 22 landoj, inter ili novaj statoj kiel Estonio, Ukrainio, Kroatio kaj Slovenio. El Hispanio ĉeestis 8 kongresanoj. Ankaŭ okazis naciaj kongresoj de Francio kaj Italio. Partoprenis gravaj personoj tiel de Esperanto kiel de la politiko kaj la RAI (Itala radio televido). La kongresejo estis 5 km. for de Verona, sed aŭtobusoj kunportis la kongresanoj al la urbo kiam estis bezono. Inter la okazaĵoj, mi rimarkas la solena inaŭguro, bufeda vespermanĝo kaj oficiala balo en hotelo "Leon d'oro", publika debato de la kongresa temo kun samtempa tradukado en itala kaj Esperanto kie okazis viglajn diskutojn en alta nivelo. En la kongresejo okazis interesaj konferencoj pri interlingvistiko kaj terminologio, ankaŭ meso en Esperanto kuncelebrita de 4 pastroj kaj kun opera kanto. La poŝto faris specialan poŝtstampo. La teatra vespero ne okazis ĉar la bulgaroj ne venis por la jugoslava milito. Ankaŭ ne okazis paraŝutista spektaklo pro la pluvo. Kontraŭe la du elskursoj al Garda lago kun sursipa vespermanĝo estis tre amusa kaj kun bela vetero same kiel la ekskurso al Mantova.

Ekzempleroj: 125

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

13-18a aŭgusto. Esperantista Renkontiĝo. Alsasua (Euskadio)
77-a Universala Kongreso. 25-a julio-1-a aŭgusto. Vieno (Aŭstrio).

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

(MEL oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centriĝi madridajn esperantajn informojn)
Ĉiu lunde ni kunvenos dum julio je la 19.00 horo en la sidejo de MEL,
Atocha 98-4°. En Aŭgusto ne okazos kunveno en la LICEO.

Oni daŭrigos kunvenon ĉe Ateneo de Madrid (Prado 21) la 14-an de oktobro,
merkredo, kaj konversacian rondon ĉe MEL la 7-an de septembro.

21-an de septembro. Prelego kun fotografaĵoj de Carmen Suárez:
"Promenante oni vojigas". Ĉe MEL.

OKAZIS EN MADRIDO

En ekspozicio pri "La familio de Pascual Duarte" en Nacia Biblioteko oni
povas vidi, inter la tradukoj al 30 lingvoj, esperantan version de
Fernando de Diego eldonita de Barcelona Esperanto Centro.

FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ

Con el objeto de ayudar a sufragar los gastos de la
OFICINA DE HEF EN MADRID el Liceo enviará (octubre
o noviembre) a todos los grupos que reciben NIA VOĈO
participaciones de LOTERIA DE NAVIDAD POR VALOR DE
5.000 pesetas. Os roganos que nos aviseis si quereis
más cantidad y en especial, para evitar gastos,
HACEDNOS SABER SI NO quereis que os lo enviemos.

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Atocha 98-4°
28012 Madrid

Asociación de Utilidad Publica Municipal

Disdonas Madrida Esperanto-Liceo

Nia Voĉo majo-1992

(Aperonta en Boletín).

7 ABR

Atentu homoj, videblas ĵurnalisto!

Okaze de informa cirkulero pri kurso, dispoŝtita al amaskomunikiloj, ni ricevis diversajn reagojn. El ili, du fruktis al personaj kontaktoj kaj fine al tute malsamaj rezultoj:

Telefonis al la HEF-oficejo ĵurnalistino de ĉi-kvartala gazeto "Chamberí". Ni aranĝis renkontigon en la oficejo, kie dum preskaŭ unu horo ŝi registris per kasedilo, skribis per skribilo kaj demandis per sia buŝo... por poste ĉion fuŝi! Zorgajn kaj objektivajn informojn ŝi alligis al kaĉo el miksitaj misoj, per tre malbona kastilia lingvo!

Ŝi registris la judecon de Zamenhof... sed ŝi skribis, ke li estas germano.

Ŝi registris ke la oficejo ekzistas ekde komence de la 70aj jaroj, ke la sidejo de HEF regule aliurbigis post kelkaj jaroj, ke antaŭ unu jaro oni komencis modernigi la oficejon... sed ŝi skribis ke HEF vagadis ĉiujare de urbo al urbo kaj la oficejo ekzistas nur de antaŭ jaro.

Ŝi registris gustan kaj objektivan priskribon pri la internacia movado... sed ŝi skribis ke la "landoj" kie estas plej da esperantistoj estas Afriko, Sudameriko, ktp.

Ŝi registris klaran preparolon pri Pasporta Servo, sed ŝi skribis ke TEJO ofertas al siaj membroj senpagan restadon en eŭropaj junulargastejoj.

Ĉu indas reagi al tiomaj fuŝoj? Se oni afable petus de ŝi ĝustigon de la informoj, probable ŝi skribos ke HEF minacas denuncon... Do, fuŝulojn oni prefere simple ignoru. Ni ne plu donos informojn al ŝi; cetere, kiel ni rimarkis, estas amuze ke verŝajne oni povas labori kiel ĵurnalisto sen ĝusta regado de la kastilia.

Aliflanke, ni tre ĝojas ke ĵurnalistino kun kiu ni jam havis bonan kontakton okaze de intervjuo por revuo, telefonis reintervjui por malfrunokta junulara programo de Onda Madrid, kie ŝi nun laboras. Ŝi faris interesajn demandojn, kiujn oni telefone registris. Je la unua kaj duono, la 11an de marto, la radiostacio elsendis la rezulton, kiu estis tre alloga, profesinivela kaj objektiva raporto. Malfeliĉe, Onda Madrid ne estas tre aŭskultata radiostacio en Madrido, sed iom post iom la kontaktoj kun la amaskomunikiloj oftigas kaj decigas. Tiun kontakton kun ŝi ni zorge flegados.

Do la konkludo estas, ke, sendepende de la ĝusteco kaj kvalito de la informoj donitaj de ni mem, ĉie ekzistas same fuŝemaj homoj kiuj malhelpas agas, kiel homoj kiuj konscie prenas sian laboron por oferti bonan kaj dignan servon al la socio. Sperto lernigas pri tio. Tiujn oni preteratentu, ĉi tiujn oni aligu.

Marcos Cruz

Georgo Kamaĉo

HEF- CO deĵorantoj klarigas noton aperintam en kvartala gazeto "Chamberí", kiun komentariis Lupe, hispanlingve, pasint-monate.

KONKLUDO: Kiel ni jam scias antaŭ-longe, oni devas doni skribitaj informoj al ĵurnalistoj ĉar ne ĉiuj estas lerta kaj la plej multaj ne bone komprenas kasede. SKRIBE KAJ LAŬ LA JURNALA FORMATO.

D. Manuel González García
SECRETARÍA
COMISION DE PROGRAMACION DE
EMISIONES DE SELLOS Y DEMAS
SIGNOS DE FRANQUEO

Dirección General de Correos
y Telégrafos
MADRID

de ... de 1992

Estimado Sr.:

Le escribo la presente para apoyar la petición de emisión de un sello conmemorativo con motivo del 78 Congreso Universal de Esperanto que tendrá lugar en España el próximo año 1992.

A este congreso se espera una asistencia aproximada de entre tres y cinco mil personas de más de cincuenta países, la mayoría de ellos procedentes del mundo de la Cultura, las artes, las ciencias y de organizaciones internacionales que tienen como objetivo el estrechar lazos de hermandad y las comunicaciones entre los ciudadanos de todo el mundo. Como sabe el idioma Esperanto está adoptado y apoyado por la Unión Postal y Telegráfica Internacional, siendo utilizado en el envío de todo tipo de comunicación internacional.

Este congreso es de gran importancia para nuestro país, y tendrá una amplia repercusión internacional, la cual será potenciada mejor con la emisión de ese sello.

Dándole las gracias de antemano, le saluda atentamente:

La Asociación:
Dirección:

O F I C I A L A P O S T K O N G R E S O 1 9 9 3 E N M A D R I D
=====

Okaze de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto en Valencio, 24-31 Julio 1993, oni organizos antaŭ kaj postkongresojn.

Por la Antaŭkongreso jam estas oficiala invito okazigi ĝin en Barcelono. Por la Postkongreso estas invito de Murcio, por aranĝi ĝin ĉe la Manga del Mar Menor.

Laŭ sugesto de UEA, kaj konsiderante ke estas kutimo en la lastaj jaroj organizi ne nur unu, sed plurajn postkongresojn, por doni okazon al la eksterlandaj vizitantoj koni diversajn partojn de la kongreslando, estas ideo de la LKK organizi duan postkongreson en la ĉefurbo de Hispanio, kie jam en 1968 okazis la Universala Kongreso.

Por bone organizi ĝin oni bezonas la helpon de la loka esperantistaro, kvankam la plej granda parto de la laboro povas esti farita en Valencio, fare de la LKK, nome la serĉado de hoteloj, la organizado de ekskursoj, la aliĝado, la korespondado, ktp.

Tion kion ĉefe oni bezonas de la madridaj esperantistoj estas homoj kiu pretas akompani la kongresanojn dum tiuj tagoj; organizi iun vesperan kunsidon aŭ manĝeton kun ili; kelkaj homoj kun sufiĉe bona lingva nivelo por funkcii kiel ĉiĉeronoj aŭ tradukantoj de la hispanlingvaj ĉiĉeronoj dum la ekskursoj, ktp.

La postkongreso estas preskaŭ nur turisma afero kaj ne vera kongreso, do la laboro estos tre agrabla kaj facila, kaj estos ebleco por multaj esperantistoj konatiĝi kun la eksterlanda esperantistaro.

Ĉi tiu postkongreso daŭros maksimume kvin tagojn (la kvin unuaj tagoj de la monato Augusto de 1993), kaj kvankam ne oni bezonas multajn personojn por ĝi, oni bezonas scii kiom da madridaj esperantistoj pretas kunlabori. Pro tio la LKK petas ke ĉiu kiu pretas kunlabori por la sukceso de ĉi tiu grava evento, plenigu la jenan enketilon:

NOMO:

AGD:

LINGVA NIVelo: a-Tre bona. b-bona. c-mezbona. d-malbona

ADRESO:

URBO:

TELEFONNUMERO:

ĈU VI HAVAS IUN PROPONON AŬ SUGESTON?

Bonvolu sendi ĉi tiun enketilon tiel baldaŭ kiel eble al:

LKK Universala Kongreso de Esperanto
Gran Via Fernando el Católico 45, 3a
46009 VALENCIA

Se vi deziras aldonajn informojn, vi povas telefoni al Augusto Casquero telefonnumero (96) 3-40-13-69

(Al Nikola Rašić)

VIA Voĉo
Majo 1992¹

DISDONAS: Madrida Esperanto Liceo Universala Kongreso de Esperanto Valencia 1993

PROTOKOLO DE LA KUNVENO DE LA LKK KUN LA HISPANA ESPERANTISTARO
=====

MADRIDO 29/02/1992

Ekde la 10.00 ĝis la 17.00 kunvenis la LKK de la 78-a UK kun reprezentantoj de la hispana E-o movado ĉe la sidejo de Madrida Esperanto Liceo por paroli pri la demarŝoj ĝis nun faritaj kaj pri la estonta agado. Ĉeestis entute 25 homoj el la jenaj landpartoj: Valencio (9); Madrido (9); Santiago (1, la prezidanto de HEF); Valladolid (2); Vitorio (2, unu el ili estas la prezidanto de HEJS); Santander (1); Callosa de Segura (1).

Oni komencis paroli laŭ la jena tagordo:

1.- Informo pri la demarŝoj ĝis nun faritaj: La prezidanto de la LKK, Augusto Casquero parolis detale pri tio, kaj legis la protokolon de la vizito al Valencio de la komisiono de UEA; sekve li legis la deklaron de la urbodomo de Valencio pri la helpo al la kongreso, en kiu oni ofertas homan kaj teknikan helpon, kiuj poste devas konkretiĝi; oni informis ankaŭ pri la promeso de la Konsilantaro pri Kulturo de la Valencia Aŭtonoma Komunumo doni subvenciojn de almenaŭ du milionoj da pesetoj al la UK. Ankaŭ pri la propono de eldonejo eldoni la unuan kaj duan bultenon kaj kongreslibron tute senpage por la kongreso, atingante reklamojn. Same oni informis pri la demarŝoj faritaj ĝis nun por atingi subvenciojn de la Ministerio pri Kulturo, de diversaj privataj entreprenoj kaj de la Europa Komunumo, kiuj ĝis nun ne havas respondon.

Oni informis ke la rilatoj kun la Centra Oficejo de UEA ne estis tiel bonaj kiel ni ĉiuj dezirus, ĉar kutime ni ricevas respondojn al niaj petoj kaj demandoj tre malfrue, kaj kiam ili venas, ĉiam estas urĝaj, post perdi monatojn. Ankaŭ oni informis ke UEA ankoraŭ ne decidis kiun vojaĝagentejo oficiale kunlaboros kun ni, kio okazis ke multaj demarŝoj kiuj kun ilia helpo irus multe pli rapide kaj facile eĉ ne oni povis komenci.

Poste oni legis al ĉiuj, detale, la jenajn dokumentojn de UEA: a.- Kongresa Regularo (oni diris kiujn punktojn estas jam plenigitaj kaj kiuj restas); b.- Kongresa Rutinaro; c.- Dumkongresa Funkciado; d.- Provizora Laborplano por la 77-a UK. Ĉar oni supozas ke ĉiu ĉeestanto estas eventuala kunlaboranto de la LKK oni diskutis detale multajn punktojn por ke ili lernu kion fari.

2.- La dua punkto estis la Antaŭkongreso: Oni informis ke Barcelono preta ĝin organizi, kaj oni legis leteron de Salvador Aragay, kiu aldonis la provizoran programon de la Antaŭkongreso, sen detaloj ankoraŭ pri prezoj.

3.- Postkongreso: Oni informis ke estas invito de la murciaj esperantistoj organizi la Postkongreson ĉe la mediteranea marbordo, en "La Manga del Mar Menor", sed ankoraŭ ne oni sendis pli konkretajn informojn pri programo, prezoj, respondeculoj, ktp.

Laŭ sugesto de la komisiono de UEA kiu vizitis Valencion, oni proponis al la madridanoj okazigi postkongreson en Madrido. Ĉar ĉi tio estis surprizo por ili, oni decidis fari poste enketon al la madridaj samideanoj pri ĉi tiu afero. La LKK ofertis al ili, se ili kaj UEA tion aprobus, helpe ĉefe en la serĉado de hoteloj, organizado de ekskursoj, administrado, informado, aliĝado, ktp, kaj la madridanoj devus zorgi pri la esperantaj aranĝoj, la serĉado de taŭgaj esperantaj ĉiĉeronoj, ktp.

4.- Internacia Infana Kongreseto: Aŝo informis ke jam oni starigis kontaktojn kun Fettes, kaj ke la komisiono de UEA vizitis lokon, en vilaĝo proksima de Valencio, taŭga por tio. Oni petis al la ĉeestantoj ke ili klopodu instrui infanojn serioze por partopreni tiun kongreseton, kaj oni petis kunlaborantojn por la organizado.

5.- Junularaj Aranĝoj de la UK: Alberto Bermell informis pri la projektoj tiurilate, ĉefe la aferoj de malmultekosta loĝado kaj manĝado, la distraĵoj por la junularo, la oficialaj programeroj por ili, kaj pri la kontaktoj, jam starigitaj, kun la nova prezidantino de TEJO.

6.- ILEI Konferenco: Oni informis ke apud Valencio oni trovis adekva-

oni informis ke la tuta hispana membraro de ILEI pretas kunlabori.

7.- Kongreso de la Blinduloj: Oni informis ke, kvankam oni skribis al Otto Pritz oferante organizi tion, kaj informante ke jam oni starigis kontaktojn kun la hispanaj blindulaj asocioj, kiuj ege deziras helpi, ĝis nun ni atingis nenian reagon el LIBE.

8.- IKU kaj Kongresa Temo: La prezidanto de HEF, profesoro Alonso, kaj la doktorino Urueña sin oferis por serĉi diversajn kongresajn temojn por proponi poste ilin al UEA. Ankaŭ ambaŭ sin oferis por kunlabori en ĉio rilate la IKU.

9.- Artaj arangoj de la UK: Añò kaj Gimenez informis pri la demarŝoj tiurilate faritaj. Añò serĉas hispanajn artajn programerojn por la nacia vespero. Miguel Gutierrez, el Santander, informiĝos pri la plej gravaj kaj taŭgaj esperantistaj artistoj de la tuta mondo, kaj starigos kontaktojn kun ili. Miguel Fernandez, el Madrido, sin proponis por serĉi la plej taŭgan teatran verkon por esti ludata dum la UK, kaj por informiĝi pri bonaj teatraj teamoj tra la tuta mondo kaj starigi kontaktojn kun ili.

10.- Poŝtmarko: Peris informis pri la demarŝoj faritaj por atingi la eldonon de oficiala poŝtmarko okaze de la UK. Nun oni atendas la respondon kaj oni petis al multaj esperantaj asocioj, unuopaj esperantistoj kaj filatelistaj asocioj ne esperantistaj sendi apogleterojn al la koncernaj instancoj.

11.- Kongresa Simbolo: Sempere informis ke, kvankam oni ellaboris diversajn desegnojn tiucele, UEA akceptis neniun, kaj ni pretigas kelkajn novajn, kvankam estas desegno, kiu apartenas al valencia esperantisto, kiu ŝajne plaĉas al Simo kaj Nikola, ankoraŭ ne estas oficiala decido, kaj pro tio ni ne kuraĝas komenci elzpezi monon por eldoni foliojn, kovertojn, propagandilojn, ktp.

12.- Turismaj broŝuroj: Oni informis ke oni starigis kontaktojn kun la lokaj turismaj oficialaj instancoj. Jam estas preta la traduko de la turisma broŝuro de la urbo Valencio, kaj de la teksto por la unua bulteno, kiujn ni sendos al la centra oficejo por ke ili kontrolu ĉion. Ni havas kontaktojn kun la bierfabriko "El Aguila" por ke ili pagu la eldonon de la turisma broŝuro, kaj kun tiu alia entrepreno kiu kontraŭ reklamoj eldonos la unuan bultenon. Ankaŭ oni petis al Madrido, Ministerio pri Turismo, la eldonon de 600 afiŝoj por la UK, sed ni ankoraŭ ne ricevis respondon.

13.- Volontula Reto: La vicprezidanto de la LKK, Juan Fontecha, parolis pri la organizado de volontula reto, konsistanta el hispanaj esperantistoj, kiuj pretos kunlabori ĉefe dum la UK. La ideo estis bone akceptata de la ĉeestantoj kaj oni komencos tuj fari novan liston de la eblaj volontuloj.

14.- La hispanaj esperanto asocioj kaj la UK: Oni proponis al la ĉeestantoj ke la hispanaj esperanto asocioj sin dediĉu dum la jaro 1993 al ĉio rilate la UK-n kiel ĉefa tasko. La prezidanto de HEF, sinjoro Alonso, kaj la aliaj ĉeestantoj tute konsentis.

15.- HEF kaj la UK: Ankaŭ oni petis de HEF ke la ĉefa laboro de tiu federacio dum la jaro 1993 estu la kunlaborado kun la UK. La prezidanto kaj la aliaj ĉeestantoj tute konsentis, kaj eĉ oni decidis ne okazigi nesian kongreson dum la jaro 1993, kaj dediĉi la tutan forton de HEF al la UK. Pro tio la hispana kongreso ne okazos, kaj nur oni organizos Ĝeneralan Kunvenon de la Membraro de HEF ene de la UK.

16.- Ĉeesto de la Esperanta Koruso "Verda Stelo" al la UK de Vieno: La direktoro de la koruso, Pedro Vilarroig, diris ke estas grava deziro de la membroj de la koruso iri al Vieno, sed ke estas financaj problemoj. Ili petis subvencion al la urbodomo de Madrido por ĉeesti la Hispanan Kongreson de la nuna jaro en Mèrida, kaj atingis 200.000 pesetojn, kaj pro tio ne oni povas ree atingi subvencion de la sama instanco en la sama jaro. Ankaŭ la Madrida Aŭtonoma Komunumo ne donas subvenciojn por vojaĝoj, nur por aferoj kiuj okazas en Madrido. La koruso petos subvencion al la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj por iri al Vieno, sed la respondo oni devos atendi. La LKK petis por ili al la Ministerio pri Kulturo 800.000 pesetoj por tiu vojaĝo, sed ankoraŭ ne oni ricevis respondon. Sen subvencio la koruso ne povos vojaĝi.

Augusto 1993

NIA VOĈO

Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4^a.29012 Madrid

Redaktas Lupe Sanz

Septembro 1992

GEORGO KAMAĈO, AKADEMIANO DE ESPERANTO (Informas Juan Carlos Ruiz)

La hispana verkisto Georgo Kamaĉo (GK), dudekkvinjara, estis elektita fine de Majo nova membro de la Akademio de Esperanto, kaj fariĝis tiel la plej juna persono kiu atingis tiun prestiĝan honoron.

La Akademio, nuntempe konsistanta el 45 membroj (nur 2 hispanaj: J.Régulo kaj GK), renoviĝas po triono ĉiuj 4 jaroj, kvamkam eblas la reelektado. La kandidatecon de GK apogis du trionoj de la akademianoj, kio estas granda merito.

Georgo esperantiĝis en 1980, pere de la koresponda kurso de Callosa de Segura, kaj aktivis en Madrida Esperanto-Liceo en la epoko kiam HEJS translokiĝis al Madrido. Li studis araban filologion, kaj regas la anglan kaj la finnan lingvojn. Krome li parolas la francan, la germanan kaj la hungaran.

La ĉefa verkaro de la nova akademiano konsistas el jenaj kontribuoj:
Libroj: "Pandemonio" (Eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo), "Sur la linio" (Berkeley Eldonejo)

Rakontoj: 5 rakontoj aperintaj en la antologio de esperanta prozo "Trezoro", 2 rakontoj aperintaj en "Sferoj 6" (Grupo Nifo-Santander).

Georgo Kamaĉo famiĝis kaj revoluciis la esperantan beletron okaze de la literatura konkurso de UEA en 1990, kie li atingis 5 premiojn en tri malsamaj kategorioj: originala prozo (1-an, 2-an kaj 3-an premiojn), originala poezio (2-an kaj 3-an premiojn), ankaŭ li ricevis honoran mencion en la kategorio eseoj.

Nuntempe li preparas novan libron kune kun aliaj aŭtoroj hispanaj kaj portugaliaj. La originala stilo de GK en la lastaj jaroj baziĝis sur vortludismo kaj konceptismo. Nun li deklaras al "Nia voĉo" ke li pensas esplori novaj stiloj. Ekde tiu-ĉi paĝoj, la membroj de MEL gratulas tutkore nian akademian-amikon, juna majstro de Esperanto.

REĜA TRADUKO

Pasintan julion, Georgette, ricevis telefon-alvokon de la Reĝa Domo petante tradukon de letero sendita de ĉeka esperantisto. Ĝi temis pri peto de poŝtmarkaj kolektoj rilate olimpiaj ludoj. La korespondanto sendis, kiel donaco por la Reĝino, kelkajn poŝtmarkojn de la Infano Jesuo de Prago.

Denove la telefon-numero de Georgette, kiu estas hejme preskaŭ la tutan tagon, solvis la problemon dum labor-horoj. Reĝa Domo ankaŭ havis telefonnumeron de MEL kaj HEF-CO sed ĝi preferis personan kontakton.

ORA KAPRO

"Asociación de esperantistas cabreados de Madrid" premias pere de ORA KAPRO de septembro al Komisiono de Eŭropa Komunumo kiu ankoraŭ ne malfermis, en Bruselo, inform-centron de la Eŭropa oficejo por malpli parolataj lingvoj. Tiu-ĉi centro havas 231.000 ekuoj de la 1991 buĝeto. (DOCE C162/1992)

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

4an-12an de Oktobro. Duaj Esperantaj Labortagoj. Torrox (Málaga).
12an-13an decembro. Portugala Kongreso de Esperanto. Olhão (Algarve-Portugallio)
78-a UNIVERSALA KONGRESO. 1993 julio. VALENCIA.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

(MEL ofertas siajn paĝojn al HEF-CO por centrigi madridajn esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj)

Ciu lunde ni kunvenos dum septembro je la 19.00 horo en la sidejo de MEL, Atocha 98-4º.

Oni daŭrigos kunvenon ĉe Ateneo de Madrid (Prado 21) la 14-an de oktobro, merkredo.

- 21-an de septembro. Prelego kun fotografaĵoj de Carmen Suárez:
"Promenante oni vojigas". Ĉe MEL.
- 19-an de oktobro. Prelego de Juan Carlos Ruiz Sierra. "Expo 92 aŭ Seviljo alimaniere". Ĉe MEL.

ADRESARO DE ESPERANTAJ GRUPOJ

MEL aliafoje, nun lasta, petas al ĉiuj grupoj kiuj ankoraŭ ne sendis siajn datumojn (vidu modelon aneksitan) bv. sendi rapide por eldoni kompletan adresaron de VERE FUNKCIANTAJ Hispanaj Esperantaj Grupoj, kun oficialaj datumoj se eblas. (Se vi jam sendis viajn datumojn bv korektu erarojn aŭ kompletigu ilin). Adresaro aperigas kun la novembro numero de NIA VOĈO poste MEL nur sendos sian bulteneton al listitaj grupoj.

GIS NUN, NUR 14 GRUPOJ SENDIS DATUMOJ KAJ NE ĈIUJ ESTAS KOMPLETE PLENUMITAJ. Bv ankaŭ sendi kopion de viaj statutoj por la oficiala dosiero de HEF-CO.

Con el objeto de ayudar a sufragar los gastos de la OFICINA DE HEF EN MADRID el Liceo enviará (octubre o noviembre) a todos los grupos que reciben NIA VOĈO participaciones de LOTERIA DE NAVIDAD POR VALOR DE 5.000 pesetas (25 papeletas a 200 pts cada una). Os rogamos que nos aviseis si quereis más cantidad y en especial, para evitar gastos, **HACEDNOS SABER SI NO** quereis que os lo enviemos. El pago, una vez recibido el envío, lo hareis mediante ingreso de 5.000 pts en la cuenta de HEF, Caja Postal nº 14011966, enviando copia del resguardo al Liceo de Esperanto (Atocha 98- 4º).

ESPERANTO ĴURNALE

Dank' al Cesar de Mosteyrín, "El Adelantado de Segovia" publikigis artikolon pri Esperanto, en tiu-ĉi okazo rilate la UK de Vieno. Por centrigi informojn aperinta-ontajn en revuoj kaj ĵurnaloj pri Esperanto, kaj por faciligi inform-agado de HEF-CO bv. sendi al Madrido kopion de ĉiuj artikoloj kiuj aperas hispane pere de via kontribuo.

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4º
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Publica Municipal

.....

N I A V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4*. 28012 Madrid

Oktbro 1992

Redaktas: Lupe Sanz

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

(Nia voĉo ofertas siajn paĝojn al HEF-CD por centrigi madridajn esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletín)
Ĉiu lunde ni kunvenos, je la 19.00 horo, en la sidejo de MEL, Atocha 98
Oni daŭrigos kunvenon ĉe Ateneo de Madrid (Prado 21) la 14-an de oktobro,
merkrede je la 18.30h.

5-an de oktobro. Konversacia rondo, laŭ peto de HEF prezidanto, pri "HEF kaj UK de Valencio". Partoprenos reprezentanto de HEF.
19-an de oktobro. Prelego de Juan Carlos Ruiz Sierra. "Expo 92 aŭ Sevilio alimaniere". Ĉe MEL.

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

4an-12an de Oktobro. Duaj Esperantaj Labortagoj. Torrox (Málaga).
12an-13an de decembro. Portugala Kongreso de Esperanto. Olhão (Algarve-Portugallio)
78-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. 1993. 24-a ĝis la 31-a de julio.
VALENCIA.

T - Ĉ E M I Z O J

MEL ofertas someran T-ĉemizon po 600 ptjn, plus sendokosto. 20% rabato se vi aĉetas pli da 20.

* * * Ni sendas rembuse * * *

**L O T E R I O
L I C E O**

N-ro 2 8 0 2 9

ESPERANTO ĴURNALE

La fervoja revuo "Via libre", eldonita de RENFE, inkludis en ĝia septembra numero, artikoleto pri pasinta IFEF-kongreso, la teksto estis sendita de Lupe. La ĉefredaktoro de la revuo estas preta eldoni informojn kaj novaĵojn rekte sendita de Hispana Esperanto Fervojista Asocio.

ESPERANTO EN SEGOVIO

En Segovio, grupeto de esperantistoj kunvenas merkrede ĉe "Casa del deporte." En junio Cesar de Mosteyrín finis bazan kurson en paroĥejo "Cristo del Mercado", tie tri geedzparoj de Instruistoj kaj unu pastro esperantiĝis.

SOMERUMI EN ESPERANTUJO

Pasintan someron kelkaj madridaj esperantistoj kaj liceanoj partoprenis en esperantaj eventoj: José M^a González Aboín ĉeestis UK en Vieno, Miguel Fernández vizitis esperantan grupon de Lisboa, Manolo Parra, pere de pasporta servo, vizitis Ĉekion, Pollandon kaj Hungarion partoprenante en junularkampadejo, Carmen kaj José Ramón promenigis esperantan flagon tra Santiaga vojo, Ana Manero pastporservis en Francio, ktp.

77-a UK DE VIENA (De "Fido kaj Espero" kaj aliaj)

Je la fino de julio kongresis en Vieno pli ol tri mil esperantistoj de 69 landoj. La kongresejo estis "Austria Center", impona konstruaĵo situanta ekster la urbocentro sed tre bone komunikata per metroo. En la solena inaŭguro salutis la ambasadoro de Hispanio en Vieno kiu invitis la gekongresanojn al la venontjara UK en Valencio (Madrida Esperanto Liceo aktive laboris por atingi ke ambasada reprezentanto ĉeestis inaŭguron). Ankaŭ paroladis la nepo de Zamenhof, li faris vera kanto al la interna

NIA VOĈO

Organo de Madrida Esperanto Liceo
Atocha 98-4°.29012 Madrid

Redaktas kaj eraras Lupe Sanz

Oktoebro 1992

ideo. Multaj kaj samtempaj programeroj okazis dum la kongres-semajno: ekumena diservo, Austria vespero, fakaj kunvenoj. En la Internacia Kongresa Universitato Rafaela Uruena prelegis pri "Neutraleco aŭ impikiĝo" tratante la aktualan temon pri la ebla aliĝo de Austrio al la Eŭropa Komunumo. Valenciaj esperantistoj aranĝis specialan budon por ricevi aliĝilon kaj informi pri la Valencia urbo. La transdono de la flago al Hispanio estis grava kaj kortuŝa, ĝi estis akceptita de S-ro. González Lizondo, vicurbestro de Valencio kaj parlamentano, kiu nome de la venontjara UK-urbo ricevis la flagon, esperante kaj poste hispane kore invitis partopreni la Valencian kongreson.

ORA KAPRO

"Asociación de esperantistas cabreados de Madrid" premias pere de ORA KAPRO de oktobro al TV-3/TVE kiuj introdukis anglan lingvon por titoli ĉiujn elsendojn en la Olimpiaj Ludoj. (Angla estas oficiala lingvo de Olimpia Internacia Komitato kune kun aliaj lingvoj)

ADRESARO DE ESPERANTAJ GRUPOJ

MEL, NUN VERE LASTFOJE, post unu jaro de petado (aŭ "petardo"), petas al ĉiuj grupoj kiuj ankoraŭ ne sendis siajn datumojn (vidu modelon aneksitan) bv. sendi rapide por eldoni kompletan adresaron de VERE FUNKCIANTAJ Hispanaj Esperantaj Grupoj, kun oficialaj datumoj se eblas. (Se vi jam sendis viajn datumojn bv korekti erarajn aŭ kompletigu ilin). Adresaro aperas kun la novembro numero de NIA VOĈO poste MEL nur sendos sian bulteneton al listitaj grupoj. GIS NUN, NUR 14 GRUPOJ SENDIS DATUMOJN KAJ NE ĈIUJ ESTAS KOMLETE PLENUMITAJ. Bv ankaŭ sendi kopion de viaj statutoj por la oficiala dosiero kiun Liceo donos al HEF-CO.

KORUSO VERDA STELO

Madrida Autonoma Komunumo subvenciis al "Asociación Coral Verda Stelo" pere de 100.000 ptjn por "vestaĵoj, konkurso kaj sonbendo de disko". (BOCM n-ro 199, 21an de aŭgusto).

ESPERANTAJ KURSOJ EN MADRIDO KAJ KORESPONDAJ KURSOJ

Ekde Oktobro oni instruos bazan kurson en Centro Cultural, strato Maestro Alonso 6 (Ventas). Merkrede je la 18,30 horo. Por aliaj kursoj en Madrido bv telefoni al Hispana Esperanto Federacio (91) 4 46 80 79 (aŭtomata respondilo) Korespondaj kursoj. Andalucia Esperanto Unuiĝo. Apdo.864. 29080 Málaga Kultura Asocio Esperantista. Font Nova 32.08202 Sabadell

KRISTNASKA LOTERIO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO HELPOS AL HEF

Consideranto que HEF tampoco este año hará lotería el Liceo cederá a HEF el beneficio de la que venda a los diversos grupos de Esperanto de fuera de Madrid, el donativo se ingresará en la cuenta de Fundación Esperanto para HEF-CO. Liceo enviará (octubre o noviembre) a todos los grupos que reciben NIA VOĈO participaciones de LOTERIA DE NAVIDAD, DEL NUMERO JUGADO POR EL LICEO 28.029, POR VALOR DE 5.000 pesetas (25 papeletas a 200 pts cada una). Os rogamos que nos aviseis si quereis más cantidad y en especial, para evitar gastos, HACEDNOS SABER SI NO quereis que os lo enviemos. El pago, una vez recibido el envío, lo haremos mediante ingreso en la cuenta de HEF: Caja Postal nº 14011966 (La Fundación la tiene en Ibercaja y cobra comisión). Enviad resguardo al Liceo de Esperanto.

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Atocha 98-4°
28012 Madrid

Asociación de Utilidad Publica Municipal

Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98
28012 Madrid

Madrid 14 octubre 1992

Todos sabemos que para los grupos y asociaciones de Esperanto la venta de Lotería de Navidad es importante fuente de ingreso pero los gastos de imprenta de papeletas, envío, etc. pueden ser demasiado gravosos si la cantidad vendida es pequeña (ésta tal vez sea la causa por la que HEF no se ha decidido a hacer lotería en los dos últimos años, desde que Francisca J. Yruegas dejó de ocuparse de la venta que por cierto hacía con gran maña).

Este año, de forma experimental, el LICEO, por iniciativa de Lupe, va a ofrecer 500 de sus papeletas (los números 1 a 500) a los grupos españoles de Esperanto, cediendo el beneficio de la venta a la Federación Española de Esperanto. No será mucho pero aliviará algo la penuria económica que sufre nuestra Federación.

Adjunto os enviamos para la venta en vuestro grupo
papeletas, de la lotería que juega el LICEO, por importe de
_____ pesetas (jugado 160 + beneficio 40 = 200 pesetas
precio de cada papeleta).

El beneficio de esta venta (una vez descontado el importe jugado) será ingresado a favor de HEF. Todas las papeletas con este fin son verdes y llevan impreso claramente "Donativo 40 pts para HEF".

Os pedimos que, para facilitar la contabilidad del Liceo y de la Federación hagáis el pago antes del día 1 de diciembre

Para evitar gastos de comisión bancaria el pago lo hareis mediante ingreso de _____ pts en la cuenta a nombre de la Federación española de Esperanto. Caja Postal cuenta nº 14011966. (La Caja Postal no cobra comisión y el ingreso es inmediato). NO ENVIES CHEQUES AL LICEO NI TAMPOCO LOTERIA DE VUESTRO GRUPO COMO PAGO.

Os agradeceríamos que enviarais al LICEO fotocopia del ingreso para nuestro control de pagos.

Si por alguna causa no podéis vender todas las papeletas os pedimos que las devolváis al Liceo antes del 1 de diciembre.

Nota: Como respuesta al anuncio relativo a esta cesión de beneficios de la venta de la lotería del Liceo a HEF, aparecido 3 veces en "Nia voĉo", únicamente un grupo ha contestado diciendo que no se le envíe lotería. GRACIAS A TODOS Y OJALA NOS TOQUE EL GORDO Y PODAMOS ANUNCIAR EL UK A TODA PAGINA EN UN PERIODICO.

Si los grupos respondéis aceptablemente tal vez se anime HEF a hacer participaciones para el otro sorteo de lotería que se celebra por el sistema tradicional y que tiene lugar en junio/julio, muy próximo a la fecha de nuestro congreso anual.

ESTO ES UNA INICIATIVA DEL LICEO, HEF UNICAMENTE RECIBIRA EL DONATIVO CORRESPONDIENTE AL BENEFICIO OBTENIDO.

N I A V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°. 28012 Madrid

Pedaktas kaj eraras: Lupe Sanz

Novembro 1992

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

(Nia voĉo oferas siajn paĝojn al HEF-CO por centriĝi madridajn esperantajn informojn kaj faciligi kontaktojn kun Esperantaj grupoj kaj madridaj esperantistoj pere de revuo pli ofta ol Boletín)

